

Михаил Лермонтов,
La anĝelo

tradukita de Boris Mirski

Kun kanto solena en nokta ĉiel'
Sin portis mirinda anĝel';
Kaj luno, kaj steloj, kaj nuboj
en rond'
Atentis la himnon de l' mond'.

Li kantis pri vivo sen zorga
ĉagren'
Sub branĉoj de pura Eden';
Kaj laŭd' al keruboj, al granda
Sinjor'
Elflugis sincere el kor'.

En brakoj animon li portis al
ter',
Al mond' de malĝojo, mizer';
Kaj restis la kanto en juna
anim'
Sen vorto, sen unu esprim'.

Kaj plena je stranga, mirinda
dezir'
Ĝi vagis en mond' de sopir',
Kaj tedis al ĝi post la kant' de
l' eter'
La veaj motivoj de l' ter'.

...

Михаил Лермонтов,
Der Engel

tradukita de N. N. 98

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio
estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis ti-
on.

...

Михаил Лермонтов,
Anĝelo

tradukita de Vasilij Devjatnin

En mezo de nokto, en blua
ĉielo,
Traflugis kaj kantis plej bela
anĝelo.
Kaj nuboj kaj steloj kaj lun' en
irado
Atentis kun ĝojo je l' sankta
kantado.

Li kantis feliĉajn, neniam pe-
kantajn
Spiritojn, kun Di' en ĉielo
loĝantajn;
Li kantis pri Patro ĉiela kaj te-
ra—
Kaj lia laŭdado ne estis malve-
ra.

Animon tre junan en brakoj li
tenis;
En mondo malgaja naskiĝi ĝi
venis.
Kaj sono de l' kanto en juna
animo
Restadis sen vort', sed kun viva
estimo.

Tre longe en mondo ĝi estis
premata,
Je revo mirinda pri Di' pleni-
gata!
Kaj ŝanĝi la kanton de l' sankta
sincero
Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj de
l' tero.

...

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de Boris Mirski.*

Arg-1039-2113 (2014-06-03 11:55:42)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/lermontov/angxelo.html>.

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en la Germanan de N. N. 98.*

Arg-1039-2112 (2014-06-03 17:30:50)

Tiu ĉi poem-germanigo troviĝas en la retejo <http://maschas-buch.blogspot.de/2011/09/lermontov-der-engel.html>. Vidu ankaŭ: <http://home.arcor.de/berick/illeguan/lermont1.htm>.

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de VASILIJ DEVJATNIN (*1862 – †1938).*

Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)

Pri la tradukinto vidu la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin.